Tago de Holokaŭsta Memoro 2019

Ĉiujare, la 27-an de januaro, ni markas la Tagon de Holokaŭsta Memoro, tagon de funebrado pro la milionoj kiuj perdis la vivon, kaj de honorigo de tiuj kuraĝaj individuoj kiuj helpis savi la vivon de aliaj kiuj alikaze pereus. Historiistoj klarigas, ke la Nazioj havis specialan planon por aresti ĉiujn ankoraŭ vivantajn membrojn de la familio de L.L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. La Internacia Lingvo Esperanto estis kreita por antaŭenigi pacon kaj komprenon inter la nacioj – la malon de tiu malamo kiun la Nazioj direktis al ĉiuj kiuj malsimilis ilin. Tial, oni ne surpriziĝu, ke Hitler aparte denuncis Esperanton. La tagon post la alveno de Hitler en Varsovion, la familianoj Zamenhof estis kaptitaj. La filo de L.L. Zamenhof, Adam, estis arestita kaj mortpafita; liaj filinoj Zofia kaj Lidia estis murditaj en Treblinka, kune kun lia fratino Ida. Nur la filo de Adam, Ludwik, mirakle transvivis, dank' al ne nur sia lerteco sed ankaŭ al la ŝirmado donita al li kaj lia patrino de Pastro Marceli Godlewski, de la Paroĥo de Ĉiuj Sanktuloj, en la Placo Grzybowski en Varsovio. Pastro Godlewski, kaj aliaj personoj similaj al li, tiel helpis transvivigi tiun esperon kiun oni trovas eĉ en la nomo mem de Esperanto. Universala Esperanto-Asocio honoras la memoron de la multaj esperantistoj kiuj pereis per la manoj de la Nazioj kaj rekonas la sindonon kaj kuraĝon de tiuj kiuj defiis la fortojn de teroro por savi tiujn malmultajn kiuj, minacatajn de murdo, transvivis.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041